


HAMBURG *Esperanto*



3/2007

Aprilo/Majo
Bulteno de Hamburga
Esperanto Societo r. a.



50 jara ĝemeliĝo Hamburg - St. Petersburg

En 1957, meze en la malvarma milito, Dr. Kurt Sieveking, la Hamburga urbestro, kuraĝis organizi ĝemeliĝon kun Sovetia urbo Leningrad. La kanceliero Adenauer, kiu ne volis rilatojn al Sovetunio, estis furioza pri tiu agado. Tamen la ĝemeliĝo okazis. Leningrad de nove nomiĝas Peterburgo kaj en 2007 la urboj festas 50-jariĝon de la ĝemeliĝo.

BK

Editoraĵoj

Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo r. a.*
Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg
Tel/Faks: +49 40 250 30 65

Karaj legantoj,

nun ni rapidege alproksimiĝas al la Germana Kongreso, sed ni ne limigas niajn aktivaĵojn al tio. Nia programo por

<p>Prezidanto: Jürgen Wulff</p> <p>Redaktoro: Benno Klehr</p> <p>Retpoŝto: Esperanto-Hamburg</p>	<p>Aprilo kaj Majo estas tute plena: Eĉ dum nia tradicia Ovokunveno ni havos prelegon. Ni ankaŭ nekutime ŝovas klubvesperon al vendredo, ĉar ni havos gastojn el nia ĝemela urbo Peterburgo.</p>
<p>Redaktofino de</p>  <p>n-ro 3/2007: 15-05-2007</p>	<p>En Majo sur Gänsemarkt de nove okazos Eŭropa Foiro, kie ni havos Esperanto-standon. La tradicia "ĉe-Ellen-irtago" donas agrablan kunestadon.</p>
<p>Sentenco</p> <p>La laboro amas stultulojn.</p> <p><i>Rusa proverbo</i></p>	<p>Por Jürgen Wulff prezentado ĉe Eastside en Billstedt estos plia streĉo nur kelkajn tagojn antaŭ la kongreso. Kompreneble la klubvesperoj ankaŭ ofertas varian programon. Do, spertu vivan klubon!</p> <p style="text-align: right;"><i>Benno Klehr</i></p> <hr/> <p>Ni deziras agrablajn pasko- tagojn al ĉiuj membroj kaj amikoj!</p> <p>Hamburga Esperanto- Societo</p>

Nia programo

Aprilo	Majo
---------------	-------------

<p>8 <i>Klaus Friese:</i> Eta instruĥoro pri la okuloj (dum antaŭpaska vespero <i>Ovokunveno</i>)</p> <p>12 sen klubvespero</p> <p>13 18.00 (vendredo) Rusa Vespere kun gastoj el Peterburgo (pliaj informoj sube)</p> <p>19 18.00 estrarkunsido 20.00 <i>Jürgen Wulff:</i> Caspar David Friedrich</p> <p>26 <i>Harald Schicke:</i> Biero kaj sano</p>	<p>3 18.00 estrarkunsido 20.00 Video: ZwischenSprache</p> <p>5 Eŭropa Foiro sur Gänsemarkt</p> <p>10 <i>Videofilmo:</i> U. Lins pri la historio de GEA</p> <p>17 Ĉe-Ellen-ir-tago 15.00 promenado ek de Am Gojenboom (U-haltejo <i>Horner Rennbahn</i> 16.00 Kafo kaj kuko en la klubejo</p> <p>22 (mardo) Esperanto zum Reinschnuppern (ĉe Eastside)</p> <p>23 (merkredo) 18.00 estrarkunsido</p> <p>24 19.00 Frualvenintoj vizitas la klubejon</p> <p>25-28 Germana Eesperanto- kongreso en Hamburg-Billstedt</p> <p>31 Post-kongresa resumado</p>
<hr/>	
<p>Junio</p>	
<p>7 <i>Filmo:</i> Werner Bormann pri Esperanto an Brunsviko 1906 kaj 1972</p> <p>24 Festo de la kulturoj en Ashausen</p>	

Peterburgaj gastoj

La 13an de Aprilo (vendredo) grupo de 30 Peterburganoj vizitos Hamburgon kaj nian klubejon.

Pro tio nia klubvespero ĵaŭdon, 12a de Aprilo, ne okazos. Vendredon ek de la 18a horo en la klubejo sperteblos

Rusa Vespere kun specialaĵoj, kiujn ili kunportas. Anna Butkeviĉ, prezidantino de la Peterburga Esperanto-klubo, prelegos pri la historio de Esperanto en St. Peterburgo.

UEA subtenas la internacian agadon en la Esperanto-urbo

PREZIDANTO CORSETTI EN HERZBERG

Laŭ invito de la Interkultura Centro Herzberg (ICH), la prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti, de la 12-a ĝis la 14-a de marto oficiale vizitis Herzberg Harz (centra Germanio), unuanime proklamita de la urbestro "la Esperanto-urbo". La urbestro de Herzberg, Gerhard Walter, kunvokis en la urbodomo honore al la vizitanto specialan laborkunsidon kun akcepto, en kiu partoprenis kaj la lokaj skabenoj kaj la gvidantoj de ICH. En tiu cirkonstanco la urbestro konfirmis la pluan subtenon de la urbo al la internacia agado de ICH, dum la prezidanto de UEA emfazis la varman apogon de la monda asocio de la esperantistaro al la dirita agado kaj anoncis, ke ĝi ricevos la oficialan auspicion de UEA. Post la kunsido, la urbestro regalis la esperantistan delegacion per tagmanĝo kaj samtage ĉeestis kun diverspartiaj politikistoj alian plurhoran kunvenon en la sidejo de ICH.

La loka gazetaro substrekis, ke la Esperanto-Centro Herzberg jam de kelkaj jaroj akiris grandan reputacion pro siaj sukcesoj rilate al publika apliko de la internacia lingvo en la urbo, ĝemeligita al Góra (Pollando). Kiel konate, Herzberg tutjare ofertas fak-seminariojn, studsesiojn, pedagogiajn tagojn kaj vintrosemajnojn, krom sennombraj Esperantaj kursoj por lernejoj kaj plenkreskuloj.

Lau informoj de ICH

[Re al Esperanto en Hamburg](#)